

*Kiel kun miŝera besto,
Homan korpon komercaĉas,
Ĝin premegas kaj ĝin ligas,
Ĝin tranĉadas kaj pecigas.*



*La preĝeĵ' ĝis nun ne perdis
La potencon, ĉar popolo
Malrapide konvinkigas
Kaj de l' songo vekigadas.
Saga papo tion scias
Kaj pro savo de l'potenco
Sia, li malice revas:
Iu malaperi devas.*

*En la urbo Barcelono
La popolo ekribelas,
Bombojn jetas, pastrojn batas,
Kaj cindrigas la preĝejojn.
Sed heroajn batalantojn
Arestigas, mortigadas,
Kiu sed senkonsciigis
Je mensogoj delogigis.*

*La ĵugisto ekzamenas,
Mezmortanton subigadas,
Falsigadas protokolojn
Kaj aliajn dokumentojn,
Kiuj servas por kaptilo
De la hom' honest', konscia
Kaj amik' de l' libereco,
Vastigant' de l' homameco.*

*Nur je tiaj falsigaĵoj
Kaj aliaj cent trompaĵoj,
Ferreron kondamnis kulpa,
Sendis juĝon al la reĝo.*

*Reĝ' Alfonso ekridegis
Goje kiel idioto,
Tuj al papo telegrafis,
Ke Ferreron jam mortpafis.*

*Ferrer estiis sciencisto,
Kiu ĉie sukcesadis,
Jam popolo lin komprenis,
Kiel ver' amik' lin tenis,
Batalant' por libereco
Kaj por tiu' homar' de l' mondo;
Tio kaŭzis la kaptigon,
Tio kaŭzis la mortigon.*

*La Ferrera sang' ekŝprucis
Kaj disŝprucis en la mondon,
Ĉie sendis fajreretojn,
Kiuj krias por la venĝo
De l' Alfonso reĝ' fiera,
De l' ĵugist' drakona Maŭro
Kaj por Ezerina kapo,
Ankaŭ tiu de la papo.*

*Aŭdu reĝo, ci Alfonso,
Stulta Maŭro, kaj Ezerin,
Kaj kun papo vatikano,
Vi krimuloj, mortigantoj!
Libereco vin kondamnas
Kaj scienc' malaperigos;
Etaĵ vi por ili estos,
Juĝ' al ambaŭ fine restos.*

El sudslava tradukis
D. A. KLAĜIN.



Al kuracisto, advokato, profesoro, k. s. oni pagas honorarion; al laboristo salajron. Tiu simpla kvalifika diferenco montras klare kiom da servuteco entenas la vorto laboristo.

Laboristo sin gloranta pri sia isteco similas sklavon, kiu sin glorus pri sia sklaveco.

Ne plu devas ekzisti laboristoj, sed nur laborantoj — labororoj.

La emo al uzado de vortaĵoj estas ia dandismo ĉe laboristoj.

SENNACIULO.